NIA TRIA TRAVIVAĴO EN TOGOLANDO

Januaro 2004

Mi longe memoros tiun tagon kiam, iom hazarde, sub la gvidado de nia fidela amiko Adjevi, ni malkovris konstruejon meze de polva strateto, La nuna pordo anoncis la temon :

Afabla esperantisto en la nomo de Koffi GBEGLO prezentis la projekton de sia teamo :

- proponi belan lernejon por ĉiuj infanoj de tiu-ĉi malriĉa kvartalo, ĉefe por knabinoj. Kompreneble, krom la ŝtata programo, Esperanto estos proponata kiel nedeviga lernobjekto.

Temis pri nefinkonstruita domego, kaj ni miris pri la estonteco.

Koffi konsilis al ni viziti sian landon, ĉar ni fakte intencis vagadi ĝis la norda parto de Togolando, kaj li serioze anoncis ke post tri semajnoj, la konstrulaboroj estos finitaj.
Ni iom dubetis, konante la afrikan ritmon, kaj foriris, kun kapo plena je revoj.
Post interesindaj vizitoj, renkontoj, spertoj tra la lando, ni revenis, kaj ne povis imagi : la lernejo finpretis, farbita, pura....
Reveninte Francion, ni decidas subteni tian lernejon kaj kreas asocion « Une Ecole au Togo » « Lernejo en Togolando » kiu titolas same kiel « Een school en Togo » kreita de Hans Bakker kiu ne nur subtenas sed finance kontribuegis al la konstruado de la lernejo.
Ni do kunigis kelkajn subtenantojn, ĉirkaù 35, kaj decidis ke ni mem, sine de nia asocio « La Maraude » kiu akceptas infanojn dum la ferioj, donos po unu eŭron infane, tage.
Tiu-ĉi sumo ebligas malmultekostan lernkotizon por ĉiuj gelernantoj.

Januaro 2006

Post ĝenerala kunveno de nia asocio « Une Ecole au Togo », ni nombras 8 subtenantojn kiuj deziras viziti Izon, INSTITUTO ZAMENHOF kaj Togolandon !
Ek, por la vizito. La korto plenplenas je infanoj kiuj ricevas interesan instruadon pri diversaj fakoj, manĝon laù novaj konsiloj, ne nur por plenigi la ventron, sed por resti sana....

Fakte, la proponoj multnombras, kaj la infanoj, krom la kutimaj lecionoj, lernas muzikon, kudradon, informatikon kaj...esperanton.
La akcepto en Izo nekredeblas ĉar la tuta lernejo faris sian eblon por organizi por ni ĉiuj, grandan feston kun dancoj, kantoj, muziko, teatraĵoj, poemoj, kaj granda manĝo kun ĉiuj instruistoj. Neforgesebla tago meze de viglaj infanoj kaj kortuŝa etoso dank'al la sindonema teamo de Izo.

Januaro 2009

Ni ghojegas ĉar, kiel kutime, nia fidela amiko Adjevi, kaj Yawa varme akceptas nin ĉe la flughaveno. La temperaturo altas : 38° C sciante ke ni ĵus forlasis nian vintron. Ni paceme eniras trankvilan Instituton Zamenhof dank'al la ĉeesto de Ape, la gardisto kiu dormas surloke. Jes ja, kiel esperantisto, vi povas ĝui restadon meze de mirinda infana etoso, ĉar la tieaj fondintoj konstruigis du komfortajn dormoĉambrojn por vi.

Kompreneble vi devas akcepti la lernejan ritmon, sufiĉe frue matene. Je la sesa kaj duono, eblas aùdi la valsan dancon de la pajlaj balailoj surgrunde. Temas pri la laboreto de la punitaj lernantoj : utila kaj efika tasko !

La kolegianoj eniras siajn klasĉambrojn, kaj poste aùdiĝas kantojn, tamburadon, jen la vico de la plej etaj kiuj paŝas ritme al la klasĉambroj, kantante :

« Ouvre-moi la porte, toi qui as la clef
de la grande école du monde
ce n'est pas possible de te faire entrer
mais je vais quand même essayer »

En la korto Izo invitis vendistinojn kiuj proponas bonan elekton de diversaj nutraĵoj. La infanoj kutime ricevas monerojn por aĉeti manĝon. Vi povas havi du fruktojn por la prezo de unu, por inciti la infanojn ne nur manĝi por la ventron plenigi sed por sane nutri sin.

La lernejo plenplenas, kvankam kvar pliaj klasĉambroj estis adonitaj al la 8 jam konstruitaj.

Temas pri 12 ĉambroj kaj unu alia por komputilado.

La nombro de gelernantoj ne atingas po 50 klase, sed, malfacilas trovi ununuran liberan sidlokon. Jen la sukceso de Izo kiu nun proponas bonnivelan instruon al 429 gelernantoj.

En la abelujo, ni promenas libere, salutas ĉiujn, provante tamen esti diskretaj, sed male, homoj dezirus vidi nin pli ofte !

Post vizitado en la norda kaj poste en la suda parto de Togolando, ni dediĉas la lastajn tagojn de nia vizito al filmeto kiun ni spektigos al la francaj subtenantoj de Izo. Ni organizas horartabelon kunekun Koffi GBEGLO kaj Elom Kokou ATTAGLO la pedagogia estro. Ili afable faciligas ĉion por ni, kaj post la filmado de la frumatena korto, ni eniras la klasĉambrojn.

Imagu, 50 gelernantoj, gajaj, viglaj, kiuj salutas vin, esperantlingve, kaj tuj poste

kantas por vi ĉu en la franca, ĉu en la esperanta.
La emocio fortas kiam ni partoprenas nian unuan kurson, temanta pri la CP 1, la plej etaj el Izo, 5-6 jaraj, gvidataj de ĉarma instruistino : Choupette. Ŝi paroligas la infanojn senĉese, (ni ne devas forgesi ke la franca ne estas la patrina lingvo), kantigas ilin, legigas ilin, ridigas ilin, kaj la proponoj estas tiom allogaj kiom diversaj.

Choupette en la CP 1

Post paŭzeto, jen okazas muzikkurso kun Sinjoro Emmanuel, en la kvina klaso. Kiel emeritulo, li bonvole instruas tiun fakon en Izo. Notlegadoj, dutempaj ritmo, dieso, bemolo, bekvadrato konsistigas la kurson. La gelernantoj aktive partoprenas, kaj eraroj estas korektitaj pere de elektra piano. Vi jam komprenis, temas pri klasica muziko, sed la ekzemploj tipas je afrika kutimo, ni aŭskultu lin :
« - imagu personon, kiu prenas sian motorbiciklon por viziti la bazaron. Li trankvile veturas same kiel la noto SOL natura sur la muzikliniaro. Subite, trafiklumo ruĝiĝas. Jen akcidento, jen ŝanĝo, temas pri la dieso aŭ la bemolo ! »

Emmanuel, muzikinstruisto, dum komuna manĝo en Izo !

Sed, venu, ĉar jam komenciĝos la franca kurso por la kvara klaso. La instruisto nomiĝas Parfait kaj atenteme submetas gramatikaĵojn al la adoleskantoj. Hodiaŭ, temas pri ortografo, participoj, artikoloj, pronomoj... Sekve, li proponas analizi kaj kompreni tekston kies temo trafas la koron de la gejunuloj : « malsato kaj sekeco », pri kiu la intereso gravas.

La morgaŭan matenon, ni ĵustatempe alvenas por la angla kurso. La instruisto, kaj samtempe la pedagogia direktoro, Kokou Elom, klarigas ke li antaŭe instruis esperanton, kaj ankaŭ desegnaĵon, sed devis rezigni pro tro pezaj taskoj.

Jen plenas la atento de la gelernantoj de la tria klaso kiam Elom skribas la frazojn sur la nigra tabulo. La infanoj havas librojn, kie ili sekvas la farendajn ekzercojn. La instruisto parolas, per bona angla akcento, tamen, li petas de ni ĉu ni konus anglan metodon por aŭskultigi veran anglanparoladon al la geknaboj. Ĉar, li ne certegas pri si mem, neniam vizitinte Anglion.

Sed, senkulkpigu nin, sinjoro, jen amikino kiu alportis la mantenmaĝon, kuiritan de ŝia patrino : milikaĉo kaj fritpastaĵoj !

Post satego, ni renkontiĝas kun sinjorino Akouavi DJONDO kiu instruas : <u>kudradon !</u> Jes, ja, kvinope, la infanoj de la kvina klaso grupiĝas ĉirkaŭ ŝi kaj abservas la hodiaŭan laboron : ĉenkudrero. Ĉiu havas sian propran tukpecon kaj fadenon, kaj post atentema rigardo, ili eksidas daŭrigante la laboron. La rezultoj malsamas, kaj la instruistino tute ne ŝercas klarigante ke ne estas diferenco inter knaboj kaj knabinoj.

Jen, la propono pliscii pri nia patrina lingvo, <u>franca kurso</u> por la tria klaso. Tie regas Jerôme, eksinstruisto pri la esperanta lingvo, kaj zorgeme okupiĝas pri la magazino : « IZO EN MARCHE ».
Li hodiaŭ kursas pri la strukturo de la rakonto en literaturo. Pri legata kaj skribita rakonto sur la nigra tabulo, kiun ni mire malkovras :
« Temas pri junulo kiu simple loĝas en vilaĝo kaj enamiĝas kun ĉarma junulino.
Sed ! Ambaŭ familioj rifuzas tian aliancon, kaj elrevigite, la viro decidas foriri el sia vilaĝo. Aliloke, en rivero, iu fiŝaĉo pikas lin, kaj venino invadas la dekstran kruron. Bedaŭrinde, temas pri loko kie troviĝas nek kuracisto, nek ĥirurgo.
Konsternite, la junulo petas de siaj amikoj ĵeti lin riveron, li pretas morti.
La komprenemaj amikoj akceptas kaj lin forpelas en la riveron. Neatendita kaimano krakmanĝas la dekstran kruron, tiel savante la junulon. »
Imagu la atenton de la gelernantoj, kaj kiam Jerôme instigas ilin proponi finon al la rakonto, ĉiuj konkuras pri mirinda intrigosolvo !

Ankoraŭ revigitaj, ni tamen aliras la <u>informatikan kurson !</u>
Jen, granda ĉambro kie staras ĉirkaŭ 40 komputiloj. Alvenas la gelernantoj, ili multnombras kaj ne estas sufiĉe da aparatoj : fakte multaj ne funkcias pro manko de reto. La infanoj grupiĝas po tri ĝis kvin antaŭ la ekranoj, kaj kurso komenciĝas.

Didier, la instruisto liveras hodiaŭ la sekreton de registrado de dosiero. Kie ĝi loĝas, kiel atingi ĝin per muso, kiel kliki.... La infanoj lerte funkciigas la ilon, kaj atente rigardas la etan ekranon, mirindan fenestron sur la mondon !
Sed, posttagmeze, rapidege, ni klopodas ĉeesti la esperantan kurson por la tria klaso.
Esperanto estas proponata nur por la klasoj de kolegio, krom la kvara kiu devas prepari sin por la finstuda ekzameno : « brevet ».
Gvidas la kurson Didier kiun ni ĵus renkontis ĉe komputilado.
Kompreneble, la gelernantoj salutas nin esperantlingve, kaj Didier klarigas la rolon de sufiksoj en la lingvo. La infanoj sufiĉe bone parolas sed ĉion komprenas.

Tiel disvolviĝas la lerntago de Izanoj, aktive vigligitaj de siaj instruistoj.
Ĉar mi decidis kolekti kelkajn revojn, mi proponis al kelkaj desegni siajn revojn : multaj knaboj deziras iĝi futbalistoj, kaj knabinoj kantistinoj !
Tamen ŝatus esti kuracistoj, ŝoforoj, juĝistoj, instruistoj....
Ni deziru al ĉiuj plenan sukceson, kaj ĉefe pliboniĝon de la ĉiutaga vivo,
Jen baldaŭ malheliĝos, tempo alvenis por rehejmeniri, ĉu bicikle, ĉu piede plej ofte !

Sed por ni la vera fino estis invito de la tuta teamo de Izo ĉirkaŭ mirinda festeno preparita de la afablaj vendistinoj de Izo, sub la agrabla ŝirmkorto de la novaj klasĉambroj. Senlimaj babiloj, diskutoj, interŝanĝoj, ridoj.....

Ĉu vi ankoraŭ hezitas ?

Jen nia adreso :
Une Ecole au TOGO
09800 ARROUT
FRANCE
Tel : 05.61.96.82.08
sunkompanio@wanadoo.fr

TOGOLANDO
TEL: - Oficejo (IZo): (228) 227 51 64
(228) 271 47 12
(228) 27115 57
-Posxtelefono :(228) 928 16 26
E-posxto : esp.togo@cafe.tg

Blogo : http://uneecoleautogo.sosblog.fr

Bonvolu noti ke la asocio Une Ecole au Togo akceptos vian monpartoprenon kun granda ĝojo ! Sufiĉas kontakti nin, ni klarigos ĉion !

J
GBEGLO Koffi, B. P. 13169, Lome,